

Esperantologio, Vol. 1, N-ro 3 (pp. 145-208), marto 1951. Komparu niajn recenzojn en Sc. R. 1 119 kaj 2 111. — Ĉi tiu numero enhavas sep paĝan artikolon de d-ro *Wiener* (Liverpool) pri „*Sajnprefiksoj*”, interesan artikolon de d-ro *C. Bean* (Kiril Fabo) „*Pri la Ritmoj de Esperanto*”, en kiu la aŭtoro kalkulas kion ni povus nomi „koeficientoj de probableco” por diversaj ritmoj.

La plej altajn koeficientojn (0,67) havas la amfibraka kaj la inigita daktila ritmoj, la malplej altajn (0,56) la jamba kaj trokea. Por hazarde elektitaj prozaj frazoj la koeficiento kutime troviĝas inter 0,60 kaj 0,65. Kvardek-unu paĝojn de ĉi tiu kajero plenigas la daŭrigo kaj fino de la „*Statistiko de 50 000 Tekstvortoj*” de d-ro *Leo Blaas*, pri kio validas kion mi skribis en 2 112. Kelkaj aferoj restas iom nekklaraj al mi. Neĝusta estas la alkalkulo de -ec- al la adjektivaj sufiksoj; evidente ĝi estas substantiva (p. 188). Preseraro *trovebla* estas sur p. 193, unua kolumno, 3a linio de malsupre: (-oj) devas esti (-aj). La artikolon finas Resumaj Tabeloj kaj 745 oftaj Esperantaj radikoj aranĝitaj laŭ malpliiganta ofteco kun indiko de ilia ofteco. Interese estas ke la suma ofteco de la korelativoj estas preskaŭ 6% (kio signifas ke meze unu korelativo troviĝas inter 17 tekstvortoj). Mirige estas ke la vortoj de ajna teksto konsistas meze el nur 2 elementoj. Ja la 50 000 tekstvortoj konsistas el entute 94 324 elementoj, dum inter ili troviĝas 10 351 diversaj vortformoj, 6 880 diversaj vortoj kaj 2 359 diversaj elementoj (radikoj) el kiuj 745 estas „oftaj”, kaj 1 614 „maloftaj” (t.e. troviĝis malpli ol dekfoje). La kajero krome enhavas kvarpaĝan studon de *V. Setälä* pri „*La Zamenhofa Hamlettraduko*” (1894). Inter la 6 190 tekstvortoj de ĝia unua akto troviĝas nur 9 glosoj kiuj ne troviĝas en la samjare aperinta „*Universala Vortaro de la lingvo Esperanto*”, el kiuj 6-8 estas pure internaciaj. Ĉi tiu studo sufiĉe refutas la suspekton de la germana filologo *F. Mauthner*, „ke d-ro *Zamenhof* nur dum la tradukado kredeble inventis la necesan vortprovizon”.

Finas la kajeron kelkaj koncizaj komunikoj de Prof. *W. E. Collinson* kaj d-ro *M. Wajsblum* pri artikolo de la unua en la 2a kajero, dum d-ro *P. Neergaard* atentigas pri „*Neatentitaj Zamenhofaj tekstoj*”. W. P. R.

Ni ricevis (kaj parte ankoraŭ recenzos en proksima numero) jenajn publikaĵojn: **Naŭlingva Etimologia Leksikono** de *L. Bastien*, 335 paĝoj. Kajeron de vol. 3 de **Entomogia Sinica** (en lingvoj ĉina kaj latina, kun mallongaj resumoj en Esp-o), kiun akompanas alvoko de 20 ĉinaj profesoroj (gvidanto inter kiuj estas Prof. d-ro *Io Chou*, kies adreso estas: Chang Chia-Kang, Shensi, Ĉinujo) por uzo de Esperanto por sciencaj publikigaĵoj.

La Hemoglobino, vol. 1, n-ro 1, (dec. 1950), eldonaĵo de japanaj studentoj de medicino, en japana kaj Esperanto. Oni serĉas korespondantojn: Esperanto-Instituto-Ika-Daigaku, Asahimati, NIIGATA-SI, Japanujo.

(Daŭrigo sur paĝo 49, malsupre).

408.92 : 061.23 : 378.4(443.611)

En Parizo fondiĝis Akademia Esperanto-Klubo.

Membroj de la Franca Sekcio de ISAE decidis fondi apartan klubon por progresigi pli taŭge kaj sur pli larĝa bazo la celojn de ISAE. La fondokunveno de *Akademia Esperanto-Klubo de Parizo* okazis la 16-an de Junio 1951. Ĝi akceptis la Statuton de la Klubo, kies ĉefa celo estas disvastigi la Internacian Lingvon en la intelektulaj kaj tute aparte en la studentaj medioj, unuflanke, kaj utiligi Esperanton por ĉiuj branĉoj de la scienco kaj arto, aliflanke. La fondokunveno elektis jenajn Estraron: Prezidanto: Prof. *G. Waringhien*, vicprezidantoj: Prof. d-ro *I. Lapenna* kaj Prof. *L. Laurat*, sekretario: Inĝ. *C. Naumoff*, Estraranoj: s-roj *G. Jobert* kaj *Flego*. La Kontrolkomitato konsistas el Gen. *L. Bastien*, Inĝ. *E. François*, kaj D-ro *Dronchat*. La provizora adreso de la Klubo estas ĉe Inĝ. *C. Naumoff*, 3, Av. Gén. Leperrine, Paris 12^e.